

Nikolaus Lenau,
La postiljono

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉarma estis nokt' de Maj',
nuboj de argento
flugis ĉe l' ĉielo kaj²
blovis varma vento.

Ekdorminte kuſis nun
voj' kaj strato ĉiu;
noktogradis nur la lun'
kaj krom ĝi neniu.

Kaj trankvile tra l' kampar'
iris la aero,
kie dormis la idar'
de la primavero.

Nur la rivereto sen
bruoj fluis tie,
kaj odoris floroj jen,
sonĝe idilie.

Postiljono krudis pli,
vipon li knaligis,
lian kornon laŭte li
tra la val' sonigis.

...

Nikolaus Lenau,
Der Postillon

Lieblich war die Maiennacht,
Silberwölklein flogen,
ob der holden Frühlingspracht
freudig hingezogen.

Schlummernd lagen Wies' und Hain,
jeder Pfad verlassen;
niemand als der Mondenschein
wachte auf der Straßen.

Leise nur das Lüftchen sprach
und es zog gelinder
durch das stille Schlafgemach
all der Frühlingskinder.

Heimlich nur das Bächlein schllich,
denn der Blüten Träume
dufteten gar wonniglich
durch die stillen Räume.

Rauher war mein Postillion,
ließ die Geißel knallen,
über Berg und Tal davon
frisch sein Horn erschallen.

...

²aū: flugis surĉiele kaj

Sonis de l' ĉevaloj kvar,
dum la veturado,
tra floranta la kampar'
gaja huffrapado.

Preterflugis la pejzaḡ',
kiam ni rapidis,
ke la pacon de l' vilaḡ'
mi apenau vidis.

Preterravidante mi
vidis che preĝejo,
ke en maj-feliĉo ĉi
kushis jen tombejo.

Staris alte super ni,
ĉe dekliva vojo,
pala kruco-bild' de Di',
mute en malĝojo.

Kaj la postiljon' malpli
gaja nun fariĝis,
la ĉevalojn igis li
halti kaj mutiĝis.

„Halti devas tie ĉi
ja ĉeval' kaj rado;
ĉar jen kušas“, diris li,
„mia kamarado.

...

Und von flinken Rossen vier
scholl der Hufe Schlagen,
die durch's blühende Revier
trabten mit Behagen.

Wald und Flur im schnellen Zug
kaum begrüßt – gemieden;
und vorbei wie Traumesflug
schwand der Dörfer Frieden.

Mitten in dem Maienglück
lag ein Kirchhof innen,
der den raschen Wanderblick
hielt zu ernstem Sinnen.

Hingelehnt an Bergesrand
war die bleiche Mauer,
und das Kreuzbild Gottes stand
hoch, in stummer Trauer.

Schwager ritt auf seiner Bahn
stiller jetzt und trüber;
und die Rosse hielt er an,
sah zum Kreuz hinüber:

„Halten muß hier Roß und Rad!
Mag's euch nicht gefährden:
Drüben liegt mein Kamerad
in der kühlen Erden!

...

Estas tre domaĝe, ke
kuſas li entere.
Estis li ja kara tre,
ho sinjoro, vere!

Devas halti ĉiam mi
en ĉi tiu loko,
lin saluti tie ĉi
frate per korn-voko!"

Gajan kanton sendis li
per la korn-blovado,
por ke trapenetru ĝi
al la kamarado.

Kvazaŭ respondado de
jena kamarado
sonis de la monto re
lia korn-blovado. -

Lante pluveturis ni,
kaj blowado lia,
longe postsonoris ghi
en orelo mia.

*Traduko de la Germana poemo "Der Postillon" de NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR154-2 / Arg-625-1264 (2014-08-27 13:27:24)

Ein gar herzlicher Gesell!
Herr, 's ist ewig schade!
Keiner blies das Horn so hell
wie mein Kamerade!

Hier ich immer halten muß,
dem dort unterm Rasen
zum getreuen Brudergruß
sein Leiblied zu blasen!"

Und dem Kirchhof sandt' er zu
frohe Wandersänge,
daß es in der Grabesruh'
seinem Bruder dränge.

Und des Hornes heller Ton
klang vom Berge wider,
ob der tote Postillion
stimmt' in seine Lieder. -

Weiter ging's durch Wald und Feld
mit verhängtem Zügel;
lang mir noch im Oreh lag
jener Klang vom Hügel.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas NIKOLAUS LENAU (*1802-08.13 – †1850-08-22).
Arg-625-1263 (2012-10-24 22:34:34)*

*Vidu la retejon <http://www.lyrik123.de/nikolaus-lenau-der-postillon-10951/>.
Pri la poeto vidu ankaŭ: http://de.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau.*